

La Progreso

REDACTIE-
COMITÉ

G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

**STUDIEBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 1.75 per Jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.
Postgiro 119311

W. F. KRUIT
H. KUYT
JAC. LEM JR.
H. VAN LIER
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

VERBA MODO POST „KVAZAŬ“

Ke la temo „kiun modon ni uzu post „kvazaŭ“?“, antaŭ kelka tempo prezentita de k-do Van Scheepen, trovis sufiĉe da interesiĝo, pruviĝis el la fakto, ke ni disponas pri arkoraŭ kvar tre, eĉ tro longaj artikoloj el la legantaro, kiujn ni pro la graveco de la temo volonte publikigus tutaj, se... ni disponus ankaŭ pri sufiĉe da spaco. La aŭtoroj bonvole pardonu al ni, ke ni ĉerpis el iliaj artikoloj nur la precipajn argumentojn por prezenti al nia legantaro:

K-do H. Rijpstra komprenas la konsideron de Van Scheepen, kiu lin tamen ne povas konvinki: Li partoprenas la opinion de Engholm, laŭ kiu uzo de „us“ estas pli ĝusta, kaj bazas sian opinion sur tio, ke la frazo „li aspektas, kvazaŭ li estas sana“ ne estas kompleta, sed transformiĝo de „li aspektas, kvazaŭ li estus homo, kiu estas sana“. La kondicionalo do estas trovebla kaj transiras en alian verbon, se oni resumas la propozicion, do: „li aspektas, kvazaŭ li estus sana“.

Fine k-do R. prezentas la demandon, ĉu nia lingva vidpunkto povas esti lingve leĝa por B-ekzameno? Kaj ĉu tiu ĉi lingva problemo kuŝas „sur la limo“? Tiukaze aldono de eventuala alia hipotezo liaopinie estas rekomendinda, kaj li ĝojas pro la reago de Engholm, kiu defendis la us-formon.

Ankaŭ k-do Chr. F. W. Slijper ne partoprenas la opinion de Van Scheepen. Li konjektas, ke Van Scheepen lasas sin tro multe gvidi de la nepra kondiĉa senco de l' kondicionalo, ne atentante, ke tiun modon oni uzas ankaŭ por esprimi sencojn, neesprimeblajn per alia modo. Koncerne tion lastan la oponanto atentigas pri tio, kion instruas „Tra la Labirinto“ (pĝ. 93—94) kaj „La Konsilanto“ (27—28). Li pravigas sian opinion per kelke da trafaj ekzemploj, ke en la lingvouzado ne la realo ludas la ĉefan rolon, sed la psikologia fakto, ke parolanto prezentas ian aferon tia, kia li ĝin vidas. Sed en la frazo „li batalas, kvazaŭ li estas leono“ neniu imagas la realecon de „li estas leono“, pro kio liaopinie oni diru pli ĝuste: „kvazaŭ li estus leono“. En la uzo de la us-formo kaŝiĝas ia necerteco, ŝajno aŭ dubo; kaj ĝuste pro tio Sl. preferas tiun formon en frazo kia „li aspektas kvazaŭ li estus la plej feliĉa homo“, malgraŭ tio, ke ĉi fraze tute ne temas pri vera kondicionalo. Ĝuste la us-formo tiufraze povas reliefigi, ke ĝia enhavo estas kontraŭa al la subjektiva penso de l' parolanto.

Sl. finas, rekomendante la us-formon, ĉe tio apelaciante ekzemplojn el „Plena Vortaro“, „Plena Gramatiko“, kaj de Lanti, Engholm, Rotkviĉ k.a.

Tute alian opinion esprimas k-do C. Bruins, kiu konstatas, ke la senco de „kvazaŭ“ estas kompara, ĝuste kiel la vorto „kiel“: „kiel“ komparas agojn (verbojn); „kvazaŭ“ komparas substancojn (substantivojn). „Li kuras, kiel (kuras) leporo. Li kuras, kvazaŭ (li estas) leporo.“ Kaj ĉar komparo ĉiam estas reala, ni devas uzi post „kvazaŭ“ ĉiam indikativon“. Klarige li montras, ke la propozicio „en lia situacio mi agus, kvazaŭ mi estus la mastro“ estas nekompleta anstataŭ: „se mi estus en lia situacio, mi agus, kvazaŭ mi estus la mastro“. Ĉefrazo: „mi agus“. „Se mi estus en lia situacio“ estas komplementa propozicio pri kondiĉo. Li do ne agos. Nun ni pritraktu la ceteran parton: „kvazaŭ mi estus la mastro“. Ĝi dependas komplemente de „mi agus“, kaj mem ne havas komplementan, kondiĉan subpropozicion. Kvankam ni ne

agas, ni tamen komparas. Do: „en lia situacio mi agus, kvazaŭ mi estas la mastro”. Esplorinte la kaŭzon de l' us-uzado, li konstatas, ke 1e, ĝin influas la nacia idiomo („En lia situacio mi agus, kvazaŭ mi estas la mastro”); 2e, psikaj leĝoj („Infanoj vojaĝas ĉirkaŭ la mondo, kvazaŭ ili estas Magellanes”); 3e, la us-formoj ĉef frazaj („En lia situacio mi agus, kvazaŭ mi estas la mastro”).

Trafe li pruvas la neklarecon de la us-formo per la jenaj ekzemploj:

„Mi konas sinjoron, kiu havas filon kaj patron. Antaŭ kelkaj monatoj li fariĝis profesoro. Mi ofte renkontas ĉiujn tri. Tiam mi konstatas,

1e, ke la patro aspektas, kvazaŭ ankaŭ li en sia mezaĝo estis profesoro;

2e, ke la filo aspektas, kvazaŭ ankaŭ li en sia mezaĝo estos profesoro;

3e, ke la sinjoro aspektas, kvazaŭ li estas ankoraŭ studento.

Se ni uzus en la tria frazo la us-formon, ni devus ĝin uzi ankaŭ en la 1a kaj 2a:

1e. La patro aspektas, kvazaŭ li estus estinta profesoro.

2e. La filo aspektas, kvazaŭ li estus estonta profesoro.

3e. La sinjoro aspektas, kvazaŭ li estus (estanta) studento.”

Speciale trafa estas la rezulto, al kiu venis k-do A. P. M. Lafeber laŭ aŭtodidakto cerbumado. Li konsentas, „ke ĉi per la us-modo ne nur esprimas kondiĉojn, sed ankaŭ imagojn, fikтивajn, dubajn agojn, sed tio ne signifas, ke ni tiajn agojn povas esprimi nur per la us-modo. Tiukaze ni devus ankaŭ uzi la us-modon en frazoj kiaj „mi imagis, ke li estas la plej feliĉa homo; mi dubas, ĉu li estas saĝa; ni ne scias, ĉu li venos” k.t.p. En tiaj frazoj ni ne bezonas la kondicionalon, ĉar la necerteco jam estas esprimita per la vorto „imagas” k.c. Io simila nin trafas ĉe la uzado de „kvazaŭ”. Komparante du ideojn, ni povus diri „li aspektas, kia la plej feliĉa homo” (li estas tia, kaj ankaŭ aspektas tia) aŭ „li aspektas, kvazaŭ la plej feliĉa homo” (lia aspekto impresas, ke li estas, kio tamen ne sufiĉas por pruvi, ke tiu identeco estas nepre reala). La nerealecon do jam sufiĉe esprimas la vorto „kvazaŭ”.

K-do L. tamen sentas, ke ekzistas ankoraŭ pli grava motivo por ne postuli la us-modon post „kvazaŭ”: tiu postulo „malebligus aŭ almenaŭ malfaciligus la esprimadon de multaj nuancoj de ideoj. Tiuj nuancoj nun eblas per uzo de diversaj manieroj”, kion li pruvas per la jena rakonto:

„En iu stranga vilaĝo estas vilaĝestro, kiu estas vilaĝestro pli pro la honoro ol pro siaj kapabloj. Tamen li havas bonan sekretarion. En malfacilaj kazoj la vilaĝestro multfoje agas, kvazaŭ ne li estas la vilaĝestro, sed la sekretario. Estas kompreneble, ke en multaj aliaj kazoj tiu sekretario ankaŭ agas, kvazaŭ li estas la vilaĝestro. En tiu vilaĝo estas ankaŭ farmisto, kiu tre similas la vilaĝestron; li havas saman nazon, saman dikitan ventron; li eĉ vestas sin per samaj vestoj, kaj multfoje tute aspektas, kvazaŭ la vilaĝestro. Iu fabrikisto en tiu vilaĝo ĉiam diras: „Se mi estus la vilaĝestro, mi certe estus ne tiom indulga al miaj laboristoj, kiom li”; kaj vere en sia fabriko li agas, kvazaŭ li estus la vilaĝestro. Volonte li parolas pri sia junaĝo, kaj ĉiam li parolas, kvazaŭ li estis la vilaĝestro. La nuna vilaĝestro estas jam maljuna kaj eble baldaŭ mortos. Lia nepo, advokato sen klientaro, jam nun kondukas, kvazaŭ li certe estos la vilaĝestro. Sed kial li havas la ideon, kvazaŭ li nepre estu la vilaĝestro, mi ne komprenas. Mi ankoraŭ memoras la tagon, kiam la vilaĝestro enoficiĝis kiel vilaĝestro. Lia edzino tiam estis tiom kortuŝita, kvazaŭ ŝi mem estis fariĝonta vilaĝestro (k.t.p., k.t.p.)”.

ADJEKTIVO AŬ ADVERBO?

Oni petas nian opinion pri la frazo „Hodiaŭ mi estis tro malfrua por iri piede al la laboro”. La demandinto opinias, ke „esti” ĉi fraze estas kopulativo, kaj tion pravigas, dirante, ke „esti” estas facile anstataŭigebla per alia kopulativo: „ŝajni, evidentiĝi”. Ni komencu la klarigon per alia ekzemplo: „Pro la nuna longa vintro la printempaj floroj; galantoj, krokusoj k.s. aperos malfrue: ili estos malfruj, kaj restos malfruj dum sia tuta florada tempo”.

Sed, se iu malfrue vizitas kunvenon, li malfruas nur per sia veno. Salutante lin, oni povas diri: „Vi venis malfrue”. Ĉar li tamen jam ĉeestas, ni intermiksas du ideojn: la malfruan venon kaj la jaman ĉeeston, kaj el tiu intermikso rezultas la diro: „Vi estas malfrue”. Tiun esprimon pravigas la fakto, ke al malfruanto oni povas diri: „Vi estas malfrue”, sed ke kelkan tempon poste oni jam ne diras: „Vi estas malfrue”, sed: „estis” aŭ „venis”. La malfrueco do rilatas la agon „veni”, ne lin mem, kiel en la ekzemplo pri la malfruj floretoj. Kaj en la donita frazo „malfrue” rilatas la ne nomitan agon „vekigi” aŭ „levigi”, sed ne la subjekton „mi”. Gramatike la adjektiva formo do estas la pli ĝusta; la tradicio kaj praktiko pravigis la formon adverban. Preferinda ŝajnas al ni la verba formo: „malfrui” anstataŭ „esti malfrua” aŭ „e”.

POR KOMENCANTOJ

H. Kuyt.

Vertalingen voor deze rubriek kunnen worden gezonden voor de 5e der volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave no. 3. Vertaal in Esperanto:

Zelfst. naamw., bijvoegl. naamw., meervoud.

Als het weer 's Zondags mooi is, gaan wij wandelen. Gewoonlijk verlaten wij de stad om de mooie natuur te bewonderen. Wat mooi kunnen de bossen en de weiden zijn! Altijd gaan wij met z'n vieren. Natuurlijk spreken wij op deze wandelingen slechts Esperanto. Zeer leerzaam en aangenaam zijn zulke uitstapjes. Wij proberen alle dingen die wij zien, in Esperanto te noemen. Niet altijd slagen wij hierin. Wij noteren alle woorden, waarvoor wij geen Esperanto-vertaling weten. Nadat wij thuis gekomen zijn, zoeken wij hun Esperanto-naam in een woordenboek. Die woorden vergeten wij niet gemakkelijk.

Vertaling van opgave 1.

La¹⁾ avo sidis ĉe²⁾ la rando³⁾ de la arbaro; li aŭskultis la belan kantadon⁴⁾ de la fringoj. Kia miraklo, ke tiuj malgrandaj bestoj⁵⁾ povas produkti tiajn⁶⁾ belegajn sonojn. Du horojn⁷⁾ la avo sidis tie, kiam⁸⁾ subite ekpluvis⁹⁾. Komence¹⁰⁾ pluvetis, sed post kelkaj minutoj pluvegis. La avo rapidis¹¹⁾ hejmen¹²⁾, kie la¹⁾ avino atendis lin. Li pendigis sian¹³⁾ surtuton¹⁴⁾ sur la vesthokaron kaj eksidis ĉe la tablo. Li rakontis pri¹⁵⁾ la birdoj, kiuj tiom¹⁶⁾ bele povis kanti. Atente la avino aŭskultis liajn vortojn¹⁷⁾. Ŝi tre¹⁸⁾ amis tiujn malgrandajn kantistojn, kiuj konstruas tiajn fortikajn¹⁹⁾ nestojn kaj tiom bone zorgas pri la idoj²⁰⁾. Bedaŭrinde estas, ke multaj el²¹⁾ ili en la aŭtuno forlasas nin.

1) Hier moet het lidwoord gebruikt worden, omdat er sprake is van een bepaalde grootvader n.l. mijn of onze. 2) Niet: *al*; dit voorzetsel duidt een beweging aan naar een doel, b.v.: *Mi iras al la urbo. Mi skribas al mia amiko.* 3) Niet: *bordo*, d.i. oever; hoewel in de allereerste Esp. literatuur *bordo* wel voorkwam i.pl.v. *rando*, wordt het nu gebruikt, slechts als er sprake is van een waterrand, dus oever. 4) Hoewel men vaak *aŭskulti al...* ontmoet, vooral bij slavische esperantisten, verdient *aŭskulti*-n de voorkeur, wjl men hier te doen heeft met een gewoon overgankelijk werkwoord. 5) Ook: *bestetoj*. 6) Niet: *tiujn*; *zulke* duidt een kwaliteit aan. 7) Ook: *Dum du horoj*. 8) Niet: *tiam*, hier moet een betrekkelijk correlatief gebruikt worden, daar in het eerste zinsdeel reeds een tijdsaanduiding ligt opgesloten, waarop „*kiam*” betrekking heeft. 9) Ook: *komencis pluvi*. 10) Niet: *Unue*, d.i. ten eerste, noch: *unua*, d.i. eerste; met het Nederl. woord *eerst* wordt *aanvankelijk* bedoeld. 11) Niet: *rapidis sin...*, dit woord wordt wel in het Nederl. als een wederkerend werkwoord gebruikt, bijv. *zich haasten*, maar niet in Esperanto, omdat hier geen sprake is van een handeling, die op een ander kan worden toegepast. Moet men vertalen: *Ik haast hem*, dan gebruikt men het achtervoegsel *ig*; *mi rapidigas lin*. 12) Ook: *al la hejmo*. Minder goed is *al la domo*; als het huis bedoeld wordt waar men woont, gebruikt men *hejmo*. 13) Niet: *lia*, er is sprake van de jas van het onderwerp. 14) Niet: *jako*; hiermee wordt een colbertjasje bedoeld. 15) Niet: *de*, dit voorzetsel duidt een bezit of uitgangspunt aan. 16) Ook: *tiel*. Niet: *tiu*, *tia*; in de Nederl. tekst hoort het woord zo bij *mooi*. 17) Niet: *al liajn vortojn*, na *al* kan nooit een *n* als uitgang volgen. 18) Beter dan: *multe*. Niet: *amis de tiuj...*, *ami* is een overgankelijk werkwoord. 19) Niet: *fortajn*; hier wordt bedoeld *stevig*, *hecht*, wat vertaald wordt met *fortika*. 20) Ook: *prizorgas siajn idojn*. 21) *Multe da ili* is als vertaling van *velen van hen* minder goed.

Dem.: Kiel traduki: „Zo klein als de mens, zo groots is daarentegen zijn leven?”

Resp.: Tiom malgranda (eta, bagatela, sensignifa) kiom (estas) la homo, tiom grandioza kontraŭe estas lia vivo.

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

J. Lem.

Opgave 3. Vertaal in Esperanto:

1. Mijⁿ zwager schreef mij, dat hij eerst^ddaags (*baldaŭ, post nelonge*) in Amsterdam zou komen en het door mij gevraagde boek zou meebrengen. 2. Hè, toevallig, ik zou naar u toegaan, en nu komt gij bij mij! 3. Als ik had geweten, dat je ziek was, zou ik je zeker niet gestoord hebben. 4. Hij moest zijn misdaad wel bekennen (vert.: hij kon niet niet bekennen), want alles getuigde tegen hem. 5. Een ongetrouwde dame (*fraŭlino, needzīginta virino*), haar bezigheden buitenshuis hebbend, zoekt een gemeubileerde kamer. 6. Haar ouders verloren hebbende, huurde het meisje een gemeubileerde kamer bij een harer kennissen. 7. Goede boeken zijn uw beste vrienden. 8. Vertel niet alles aan de eerste de beste (*la unua renkontito*). 9. Eerst zien, daarna overdenken, en pas dan spreken. 10. Wij hadden juist ons huis bereikt, toen het begon te sneeuwen. 11. Toen hij dat hoorde, barstte hij in tranen uit. 12. Men vertelde hem, dat hij al zijn hebben en houden had verloren; toen barstte hij in tranen uit en wong wanhopig de handen.

Vertaling van opgave 2.

LA FIGOJ KAJ LA CIDONIOJ.

(Fino)

Kiam Josefo estis veninta en la malamikan tendaron, oni tuj kondukis lin antaŭ Tamerlan; sed kiam ĉi tiu vidis la mizeran donacon, per kiu la Persoj klopodis kormoligi (kompatigi) lin, li ekkoleregis, vokis unu el siaj soldatoj kaj ordonis al la malfeliĉa Josefo surgenuiĝi. Kio okazos? Li sentis; lia vivo pendas je silka fadeno. Ĉu la soldato senkapigos lin? Ĉu li trapikos lin per sia glavo? Ĉu li torturos (tumentos) lin?...

Laŭ ordono de la Mongolo la soldato prenas unu el la figoj kaj ĵetas ĝin kun sia tuta forto sur la nudan kapon de Josefo. La suko de la supermatura (tro matura) frukto fluas sur la vangoj de la malfeliĉa viro, kiu krucigante la brakojn sur la brusto, krias: „Allah estu laŭdata!”

Dua figo frakasiĝas sur lian senharan (kalvan) kranion; denove li krias: „Allah estu laŭdata!”

Je la tria kaj la kvara figoj, la saman krion.

Tamerlan, miranta (kiu miris) pro (pri) tiu stranga (neordinara) persisto ĉiufoje ripeti la samajn vortojn, demandis al li, kial li diras tion.

„Ho, sinjoro”, respondis la pacienca delegito, „mi laŭdas Allah-on, ĉar (tial ke) mi ne plenumis la deziron de mia edzino. Si konsilis al mi doni al vi cidoniojn; se mi estus farinta tion, mia kapo sendube frakasiĝus (estus frakasita), ĉar niaj cidonioj estas tre malmolaj.”

Tamerlan vole nevole ekridegis (ne povis ne ekridegi), pardonis al la samcivitanoj de Josefo kaj indulgis ilian urbon.

Dem.: Ĉu oni devas diri „donu al mi alian funton *de* sukero”, analogie al „sian novan paron *de* ŝuoj”?

Resp.: En ambaŭ frazoj ni uzu konsekvence *da*, ĉar temas pri kvanto. La vortoj *alia* kaj *nova* neniel influas tiun uzon.

Dem.: Kial ne uzi post „t.e.” akuzativon? Oni ja troviĝas antaŭ mallongigita frazo, ekz.: „oni uzas pazilaliajn, t.e. (oni uzas) paroleblajn lingvojn.

Resp.: Vi pravas. Nia opinio „t.e.” neniel influas la kazon; kio sekvas post „t.e.” ne estas parto de l' predikato, sed laŭsence apozicio ĉe la vorto antaŭ „t.e.”

Dem.: Ĉu „tio” ne estas evitinda en: „Tio min doloras, ke mi devas tion diri al vi?”

Resp.: Certe, la subjekto de la ĉefa propozicio estas la tuta dependa propozicio „ke mi devas....” mem. Tiu subjekta propozicio estas anstataŭigebla per „tio”, sed oni ne nomu tiun vorton aparte. En la menciita frazo do ekzistas du subjektoj: *tio* kaj la dependa propozicio.

EEN WEINIG GRAMMATICA VOOR BEGINNERS

Het schrijven van telwoorden.

Deze keer niet alleen voor beginners, want meermalen wordt ons de vraag gesteld: hoe te handelen met telwoorden met of zonder uitgangen *o, a, e*, enz., los of aaneen, met of zonder koppeltekens? Uit dergelijke vragen blijkt, dat zelfs auteurs van leer- en studieboeken niet altijd consequent zijn, of zich tenminste niet altijd correct aan de regel houden, die zichzelf accepteren.

Ziehier de regels:

Bij de hoofdtelwoorden stelde men elk cijfer door één woord voor, zonder gebruik te maken van koppeltekens, b.v.: 10 = dek; 126 = cent dudek ses; 12.987 = dek dumil naŭcent okdek sèp.

Hierbij blijven de nullen als vanzelf buiten beschouwing: 1000 = mil; 1001 = mil unu; 20.080 = dudekmil okdek.

Bij alle andere telwoorden, dus met de uitgangen *o, a, e, ono, oble, oblo*, enz., en met de uitgangen *jara, taga* e.d. handele men evenzo, doch nu verbind de woorden onderling met koppeltekens om aan te tonen, dat de uitgang betrekking heeft niet alleen op het woord, waaraan de uitgang is toegevoegd, maar op het gehele getal, b.v.: mil-naŭcent-kvardek-sepa; dudek-okjara, tricent-kvardekpaĝa, dudek du dudek-trionoj.

Men schrijve dus: dek du, maar: dudek; dudek unu, maar: dudek-unua.

Schrijf in woorden:

13, $\frac{1}{13}$, de 2de helft, 24ste, ten vierde, ten elfde, 470, 470ste dag, 1947, het jaar 1947, $4 \times 4 = 16$, $4\frac{1}{4}$, $4\frac{3}{4}$, $1\frac{1}{2}$, $1\frac{1}{2}$ jaar, een veelvoud van 6, 3 x bellen, 2 maal betalen, dubbel betalen, de 11de uitgave, de 31ste dag, $\frac{31}{33}$, $12 : 4 = 3$, $1 : 2 = \frac{1}{2}$, 15 Maart 1947, 175 cent = $1\frac{3}{4}$ gulden, $104 - 81 = 23$, een maand is het twaalfde deel van een jaar, een dag is het 365ste deel van een jaar, neem jij het eerste, dan neem ik het tweede deel, dan blijft er nog één deel over.

Uitwerking van de invuloefening uit het Maart-nummer:

1. tiu, 2. tio, 3. kiun, 4. tiun, 5. tiu, 6. tiu, 7. ke, 8. tiun, 9. ke, 10. tio, 11. kiun, 12. kiu, 13. tio, 14. tio, 15. tiu, 16. tio, 17. kiun, 18. tiu, 19. ke, 20. kiu, 21. tiu, 22. tiu, 23. ke, 24. tio, 25. ke, 26. tio, 27. tiu, 28. kiun, 29. tio.

REDAKCIA KORESPONDO.

Al s-ro d-ro R.P. en M.O.: palo pro ektimo en L.P., n-^o 1, pĝ. 2, alineo 3. estas komposteraro; d.e. pala.

Praktika frazaro, kian vi evidente celas, estas „Esperantská Konversace v 1000 vetách“, aranĝita de F. Štěpánek; eld.: M. Knapp, Praha-Karlín.

DE LA ADMINISTRACIO.

Al abonantoj, ne jam pagintaj la abonmonon por '47a, ni petas fari tion en la nuna monato. Per tio ili faciligos nian administradon.

Sekcioj, kiuj prizorgas la transpagon de la abonmonoj, bonvolu ĉe tio menci la nomojn de la abonantoj, por kiuj ili pagas.

Oni atentu la novan adreson (red. kaj adm.): F.L.E., Roelantstr. 4, Amsterdam-W.

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men voor 5 April aan het redactie-adres Roelantstr. 4, A'dam-W.

Opgave 4: Vertaal in Esperanto.

DE TOENEMING VAN ONZE BEVOLKING.

In 1870 had Nederland ruim $3\frac{1}{2}$ miljoen inwoners, tegenwoordig (voor de oorlog) ongeveer 9 miljoen. Hoe is die enorme toeneming ontstaan? Niet door een stijging van het geboortecijfer. Integendeel: dit daalde van 36 tot 21 levendgeborenen per jaar per 1000 inwoners. De grote factor is de daling van de sterfte. Omstreeks 1870 stierven er gemiddeld 26 van de 1000 inwoners per jaar, tegenwoordig nog geen 9. Het frappantst is hierin de zuigelingensterfte (sterfgevallen beneden het jaar), die van 21 op de 100 levendgeborenen daalde tot ruim 3. De gemiddelde levensduur der mannen steeg dan ook in deze periode van 38 tot 65 jaar, die der vrouwen van 40 tot 66 jaar.

In dit alles weerspiegelt zich de vooruitgang op het gebied van de gezondheidszorg.

Opgave 5 :Vertaal in het Nederlands.

La propagando ne estas la tereno de nia revueto. Pri la novaj vojoj, tiurilate elpensendaj, sin okupu la organizoj. Nur koncerne la internan mision: plifortikigon de l' idealismo, de l' komuneca sento kaj precipe plialtigon de nia propra esperantiste lingva nivelo ni havas devojn.

L.P. jan. '47a.

KOKOSLAKTO.¹⁾

Post pluraj²⁾ jaroj da esplor(ad)do oni akiris bonegan kokoslakton kaj sufiĉaj kvantoj de³⁾ tiu ĉi valora nova⁴⁾ lakto baldaŭ estos survoje en konsiderindaj kvantoj⁵⁾ (en ladaj skatoloj⁶⁾ de Samoa al Anglio. Tiu ĉi lakto gustas pli intense⁷⁾ ol bovina lakto. Ĝi entenas 42% da graso kaj 4% da albumino⁸⁾.

Oni okupas sin ankaŭ per⁹⁾ esploroj pri bonaj sapspecoj, ne entenantaj¹⁰⁾ animalajn¹¹⁾ substancojn. Oni plu anoncas la malkovron¹²⁾ en Brita Hindio pere de leŭtenanto-kolonelo E. H. Hate, de vegetaja¹³⁾ fibro, kiu¹⁴⁾, ŝpinita liveras teksaĵon egale varman kiel lano kaj egale mapezan kiel silko. -

Kiaj allogoj por la estonta tempo!

„Vegetarische Bode“

Vertaling van opgave 16.

1. La instruisto petis al la infanoj fermi siajn¹⁵⁾ librojn. 2. Sia¹⁶⁾ fratino aĉetis novan biciklon. 3. Sia¹⁶⁾ frato kun sia¹⁷⁾ onklo kune promenos. 4. Ilia onklo kaj ilia¹⁸⁾ onklino estas la frato kaj la bofratino de ilia¹⁹⁾ patro. 5. Li foriris, esperante ankoraŭ gustatempe atingi sian²⁰⁾ trajnon.

1) Het sap van enkele vruchten noemt men, door zijn overeenkomst, ook wel *melk: migdala* kaj *kokosa laktoj*. 2) Niet: *diferencaj*, d.i. verschillende. 3. *Da* heeft betrekking op een onbepaalde hoeveelheid. In deze zin is het bepaald door *tiu ĉi*. 4. Niet: *valore nova*. Beide woorden hebben betrekking op *lakto*, en zijn dus bijvoeglijk. 5) De herhaling van dezelfde woorden wordt in de tekst gecamoufleerd door het gebruik van *kwanta* en *hoeveelheden*. 6) Ook: *lad(o)skatolo*. 7) Niet: *pli plene*. De smaak is intensiever. 8) in het dagelijkse leven spreekt men van eiwit als men de witte vloeistof van een ei bedoelt: *ovoblankajo*. Het eiwit, dat in de voedingsleer wordt bedoeld, is *albumino*. 9) Niet: *kun*. 10) Minder mooi: *liberaj de*. 11) Ook: *bestajn*. 12) Niet: *elpenson; inventon*. De vezel is niet uitgevonden, doch ontdekt. 13) Ook: *planta*. 14) Door wijziging der plaats van de voorafgaande drie woorden krijgt het betrekkelijk voornaamwoord *kiu* zijn plaats direct achter *fibro*, waarbij het behoort. De zin *malkovro de fibro de L. K. Hate, kiu, ŝpinita* k.t.p. geeft een zeer onjuiste indruk. 15) *ke ili (la infanoj) fermu*. 16) Onderwerp. 17) Dit heeft betrekking op het onderwerp. 18) Dit is ook nog een deel van het onderwerp. 19) Het onderwerp is *onklo kaj onklino*. 20), *ke li atingu*.

Dem.: Cu bone: „Kion vi diris, ne povas esti vere?“

Resp.: Ne; *povas esti* postulas subjekton: *tio*; kaj *tio* postulas adjektivon: *vera*.

Do: Kion vi diris, tio ne povas esti vera.

ESPERANTO EN LA PRAKTIKO

H. Velthove.

Kiam ni antaŭ kelke da monatoj petis la opinion de niaj studentoj pri la diversaj rubrikoj, venis poste neniun respondo rilate la rubrikon „Esperanto en la ĉiutaga vivo”. Pro tio ne konkludis, ke la interesiĝo pri ĝi ne estas plu tiom granda kiom antaŭe. Tial ni decidis ĉesigi ĝian aperadon kaj krome la papersituacio ne permesas al ni uzi tutan paĝon por rubriko malofte studata.

Estiĝis la demando; kia rubriko anstataŭu ĝin. Ĝi kompreneble devas esti io nova, sed tamen ne ia kutima tradukotaĵo, ĉar por tio troviĝadas jam kelkaj rubrikoj en la gazeto. La enhavo de nia studorgano estu kiom eble plej varia. Tiu starpunkto venigis al ni la ideon pri speciala scienceta rubriko.

Oni scias, ke ĝenerale la esperantistoj ne konas la Esperanto-terminaron el la populare sciencaj regionoj, kiaj matematika, teknika, geologia, botanika, k.t.p. Tio rilatas do precipe la fakojn, kiuj troviĝadas sur la programo de mezgrada lernejo.

Inter niaj studentoj eble estas multaj personoj, kiuj interesiĝas pri terminaro, kiu estas uzata ne en la ĉiutaga vivo, sed ekster tiu teritorio. Pro tio la projektita rubriko eble povos doni al la koncernaj studentoj la unuan puŝon por pli vastigi sian lingvoscion koncerne tiujn fakojn. Per ĝi oni povas fari la unuan paŝon sur tiu tereno, kaj ni ĝojos, se ni per tio kontribuos al la pligrandigo de la nombro da esperantistoj, estrantaj pli ol la ĉiutagan vortaron. Tio ne signifas, ke ni tute malatentos la ĉiutagan lingvon, ĉar en ĝi troviĝadas sufiĉe da malfacilaĵoj. En la projektita dialoga formo ni havos sufiĉe da okazo atenti ankaŭ tiun flankon.

HANDLEIDING BIJ HET VERTALEN

F. Faulhaber.

20. Si ĉirkaŭrigardis kun strangaj okuloj en la ĉambro. Tiu estis malplena, ĉar Frans foriris por ĉiam. (Die was leeg, enz.) = Ĝi estis malplena, k.t.p.

21. „La nuro, kion mi deziras, estas mia libereco.” „Tiu vi havos”, dĵris sinjorino K. (Die zal je hebben) = Vi ĝin ricevos.

22. Tiuj kartoĉoj devas esti pagataj. Tiuj kostas tri funtojn por skatolo. Ne cendon malpli. (Die patronen moeten betaald worden. Die kosten drie pond per doos. Geen cent minder.) = La kartoĉoj devas esti pagataj. Ili kostas tri funtojn por skatolo. Eĉ ne unu cendon malpli.

23. Si pensis pri sia avo, pri vagula vivo, kaj tiu ŝajnis al ŝi paradizo. (... en dat scheen haar een paradijs toe) =, vivo, kiu ŝajnis al ŝi paradizo.

24. G. grumblis ankoraŭ kelkajn vortojn, sed tiuj jam ne estis aŭdeblaj. (... , doch die waren al niet meer te horen) =, sed ili jam ne estis aŭdeblaj.

25. Vidu, tie kuŝas virvestoj. Ĉu tiuj estas la vestoj de la murdita G.? (Zouden dat de kleren van de vermoorde G. zijn?) = Rigardu, tie kuŝas vestoj de viro (of: viraj vestoj). Ĉu ili estus la vestoj de la murdita G.?

Het zal niet altijd gemakkelijk zijn, te bepalen, waar *dat* of *die* met *tiu* vertaald kan worden, waar *tiu* wèl en waar het niet op z'n plaats is. Dit is een zaak van gevoel zowel als van goede smaak. Voelt men in *dat* of *die* een zekere nadruk of aanwijzing, dan zal de goede smaak zich tegen *tiu* niet verzetten.

PRI KAMARADUMO.

Unu el niaj legantoj skribis, ke li samopiniis kiel s-ro De Jong pri la preferendo ne uzi la vorton „kamarado” en alparolo aŭ adreso.

Kompreneble, ni respektas ĉies preferon, kaj ni same plezure adresos al sinjoro kiel al kamarado.

Lian argumenton: ke ni ~~prefere~~ ne uzu tiun vorton pro tio, ke ĝi estis dum la pasintaj jaroj tiom multe misuzata de faŝistoj, ni tamen ne akceptas. Vorto povas evolue ŝanĝiĝi laŭ sia signifo; ĝi ŝanĝiĝas tamen en la buŝo de l' popolo mem, ne pro la fakto, ke dum certa tempo ĝin uzis aŭ misuzis ia internacia organizo de krimuloj. Ankaŭ aliaj ol politikaj krimuloj sin internomas kamaradoj aŭ amikoj, la plej grandaj eĉ „sinjoroj”. Tio tamen neniel influas la sencon de la vorto mem. S-ro De Jong do nepre malpravas, atribuante al „kamarado” ian malŝatan sencon; kaj nia leganto ne partoprenas ties opinion, ĉar mem li diras, ke nuntempe ekzistas nur malmultaj veraj kamaradoj.

Ĉi koncerne k-do J. L. Bruijn atentigas, ke la vorto „kamarado” devenas el la latina „camera” kaj signifas: samĉambranon, el kio rezultas iu grado de intmeco aŭ amikeco.

LINGVAJ OBSERVOJ TRA LA ESP. GAZETARO

Interese estas, ke ankaŭ „Esperantista“, revuo ĉeĥoslovaka, kiu siatempe jam atentigis siajn legantojn pri la listoj da vortoj, aperintaj en L.P., da vortoj, estiĝintaj en milita tempo, nun ankaŭ komencas publikigi tiajn vortojn. El ĝia unua listo ni menciuj: evakui (ankaŭ „Esperantista“ akceptas la ideojn 1. malplenigi lokon, regionon; 2. forigi el loko, regiono); stamkaart: *distribua ĉefkarto, distribua matrikulo*; naziisme: *naziismo*; bezetting: *subtera movado*; U.N.O.: *Unuigita Naciara Organizo*. Ni tre scivolas pri la daŭrigo de tiu listo.

„Ĝis estis ebleco, funkciis laborista sekcio en la H. Esp. Federacio.“ Tiu ĉi frazo, kiun ni trovis en artikolo de hungaro en iu internacia revuo, signifas laŭvorte: la laborista sekcio funkciis ĝis la ebleco, do antaŭ kiam ĝi fariĝis ebla! Kaj post la ebligo? Tiam ĝi jam ne funkciis? Kompreneble tio ne estis la celo de la raportinto; li celis: tiom longe, kiam ekzistis la eblo (zo lang de mogelijkheid bestond). La erara uzo de „ĝis“ (= tot, ne: zo lang) originas el slavaj lingvoj — kaj supozeble ankaŭ el la hungara.

„Se ekzistus rimedo por venigi aŭtomate al la supraj funkcioj la plej indajn homojn el ĉiuj sociaj medioj, mi certe multe malpli laŭdus la utilojn de l' heredeco. Ĝis oni estos ĝin trovinta, mi persistas kredante ke la divido de l' socio en organismoj distingaj unuj de l' aliaj kaj konstantaj tra l' forfluo de l' samaĝularoj ankoraŭ prezentas la plej malgrandajn malutilojn: ĝi entenas la konflikton kaj la senleĝecon kiujn la akstermo de l' heredaj kadroj pliinfektas kaj ĝeneraliĝas. Tiu korbo da kraboj kiu estas la interbakiĝo de l' homaj plialtigemoj gajnas estante fakita.“

Per la ĉi supra „belstila“ alineo finiĝas el la franca lingvo tradukita artikolo en iu grava internacia Esperanto-revuo, kies titolon ni prefere ne mencias.

Legante la tutan artikolon, ni image sentis nin en la tempo, kiam ĉiu, ĵus ellerninte sian elementan gramatikon, provis transmeti nacilingvain prozaĵojn en Esperanton por publikigi tiajn monstraĵojn en gazeteto aŭ libreto.

Redakcioj de nuntempaj revuoj sciu, ke Esperanto jam ne estas amatora ludilo, sed lingvo egalnivela al lingvoj naciaj. Al sia legantaro ili ŝuldas lingvaĵon korektan, ne misbakitan, havante la moralan devon rifuzi tiajn monstraĵojn kaj ankaŭ mem ne „regali“ nin per ili.

Dem.: Ĉu oni havas la rajton fiksi la lokon de la adverbo „ne“? Mia opinio ne.

Resp.: Ekzakta rajto ne ekzistas; klareco kaj logiko tamen postulas, ke oni uzu „ne“ antaŭ la vorto neata, kvankam ne ĉiam tio estas farebla. Se „ne“ koncernas rilatan vorton, oni ne povas uzi ĝin antaŭ tiu vorto, ekz.: La libro, kiun mi ne konas. Oni ja ne povas diri: La libro, ne kiun mi konas!

Dem.: Ĉu „kiom hele estas!“ kaj „kiel hele estas!“ estas bonaj tradukoj por „wat is het licht“?

Resp.: Jes, „kiom“ indikas gradon, „kiel“ manieron. Ĉar de eco (hele) oni ĝenerale indikas gradon, la uzo de „kiom“ estas pli logika. Sed, ĉar Zamenhof mem uzis „tiel“ kaj „kiel“ ankaŭ por gradoj, la uzo de „kiel“ estas tradicie pravigebla.

Dem.: Ĉu „hebben“ en la frazoj „we hebben mooi weer, we hebben verschillende mogelijkheden“ estas tradukebla per „havi“, aŭ ĉu estas nepre ĝuste skribi „esti“?

Resp.: Logike pli ĝustaj „estas bela vetero, ekzistas diversaj ebloj“. Uzo de „havi“ tamen estas nia opinio permesebla, kvankam ĝi estas naciismo. La senco de „havi“ en tiaj frazoj estas sufiĉe klara.

Dem.: „Tra la Lab.“, pĝ. 228, instruas, ke la vortradikoj ĉiam havas la sufiksojn *i*, *a* aŭ *o*. La adverbojn ni do derivas de tiaj radikoj per *e*. En vortaro ni tamen trovas *e*-signifon de „ofte, parkere precipe, nepre“: Kio estas ĝusta?

Resp.: La instruo estas ĝenerale ĝusta. Tamen Zamenhof mem faris esceptojn por kelkaj vortoj, kiuj evidente havas adverban signifon, nome por la vortoj, menciitaj de vi, kaj por „supre, laŭte“ kaj „spite“.

Dem.: Ĉu ekzistas bona vorto por „duiken“? Laŭ Van Straaten: „subakviĝi“. Kial ne „plongi“ la la franca „plonger“?

Resp.: „Plonĝi“ jam estas neologismo por „sin ĵeti en la akvon por naĝi. Ankaŭ al-ni tiu neologismo pli plaĉas ol la netrafa „subakviĝi“.

Dem.: Ĉu ekzistas pli bona vorto por „subtegmentejo“?

Resp.: Ne; nur por ĉambro en subtegmentejo: „mansardo“.

Dem.: Kio estas la ĝusta traduko por „loodgieter“? Ĉu „plumbisto“?

Resp.: Ne, „lutisto“, „luti“ (solderen) estas la ĉefa laboro en tiu metio.